# PARIZA FEDERACIO

FEDERATION PARISIENNE des CENTRES CULTURELS "ESPERANTO"

CCP 10482-04 Paris    4bis, rue de la Cerisaie 75004 PARIS    tél 278 68 86

SEPTEMBRO – OKTOBRO 1974    N° 11

Chers Amis

Aux débutants dans l'étude de la langue internationale ainsi qu'à ceux qui approuvent les efforts pour répandre l'Espéranto sans pour autant l'apprendre, je m'adresse en français, langue qu'ils comprennent.

Selon l'opinion de personnes compétentes en la matière, le problème du choix d'une langue auxiliaire internationale va se poser avec une extrême exigence non pas dans quelques décennies mais dans quelques années. En effet : la multiplicité des langues de travail à l' O.N.U. et à l' U.N.E.S.C.O., le nombre grandissant des rencontres internationales de tous genres, le développement du tourisme à l'échelle mondiale – tout cela va amener les hautes instances internationales a – enfin ! – poser le problème.

Comment le résoudront-elles ? Elles auront à choisir entre les quatre options suivantes:

1)- choix d'une langue nationale comme langue auxiliaire internationale
2)- résurrection d'une langue morte (ex. latin)
3)- adoption de l'Espéranto
4)- adoption d'une autre langue dite artificielle.

N'étant pas prophète, je ne puis dire quelle sera la solution adoptée. Mais je puis affirmer que les chances pour l'Espéranto de devenir la langue auxiliaire internationale sont plus grandes qu'elles n'ont jamais été.

Si la décision dépend d'hommes libres, intègres et de bon sens .... alors sans aucun doute la balance penchera en faveur de l'Espéranto.

L'adoption de l'Espéranto comme langue auxiliaire, neutre, internationale constituerait pour l'humanité tout entière un engagement d'une extrême importance qui accélèrerait sa marche vers son unité.

Dès maintenant, Chers Amis, prenez les devants en commençant ou en poursuivant l'étude de l'E S P E R A N T O !

Karaj Geamikoj,

Estas ESPERANTO, bonega ilo por internacia komunikado.

Estas la INTERNA IDEO, kiu antaŭen puŝas la esperantistojn por efektivigi la noblan celon de Zamenhof.

Estas la ESPERANTISTOJ ! Al multaj mankas la fido, la teama spirito kaj la amo al la homoj.

Spite de tio fluas la homa historio !

Sed ĉiu momento de tiu historio dependas de la rezultato de la ĉiumomente efektivigitaj fortoj. Se la unuopaj, grupaj, ĝeneralaj fortoj de la esperantistoj estas feblaj ilia influo estas kvazaŭ senvalora.

Do ! kuraĝe ! Ke ĉiu faru kiel eble plej multe da klopodoj por antaŭen puŝi la aferon.

Kiamaniere ?    Diversmaniere !

Sed hodiaŭ mi varme insistas por ke kelkaj kapableculoj sin proponu por gvidi elementan kurson. Nova lernjaro komenciĝas, do estas la momanto por organizi novajn kursojn.

Por tio oni bezonas gelernantojn .... kaj gegvidantojn !

Mi esperas ke tiu alvoko ricevos bonajn respondojn . Tio ne dependas de mi

S E D  D E  V I !

Roger D e s p i n e y

| | |
|---|---|
| –o– UNION FRANCAISE POUR L'ESPERANTO | LEGU ATENTE LA KALENDARON –o– |
| 4,bis, rue de la Cerisaie– 75004 PARIS – | ĉe la paĝo 4 – a |
| 9 h à 12 h –o– 14 h à 17 h | NOTU LA DATOJN |
| sauf dimanche et lundi | sur via rendevua l i b r e t o . |

PROTOKOLO DE LA KONSILIA KUNVENO - 15-an de JUNIO 1 9 7 4 -

Tiu kunveno okazis en la sidejo de U.F.E., 4 bis rue de la Cerisaie, komencis je la 14.45

Ĉeestis ge-roj: Amariglio,Benazech,Bourdeaux R.Despiney, Guillaume, Henry, J.Rousseau kaj Thierry.

Observanto: D-ro Duplan

Petis senkulpigon: ge-roj Claude, Delatte, D.Despiney, Doury, Peray, Plantiveau.

Protokolis: S-ino Amariglio.

1°) - Protokolo de la lasta kunveno .

S-ro Guillaume aldonis ke, pasintan januaron, ankaŭ S-ro J.Rousseau partoprenis la kunvenon de "Association artistique et culturelle".

Sen alia rimarko, la protokolo estis akceptita.

2°) - Dekmonata vivo de la federacio.

2.1 Resumo de la prezidanto .

S-ro Despiney resumis la agadon faritan depost meze d aŭgusto 73 ĝis meze de junio74.

-Sidejo : La aranĝo de la nova loko, ĉe la Cerisaie, la translоĝiĝo de Chabrol al la Cerisaie: la prizorgintoj ŝparis nek tempon nek penon.

23-an de septembro: unua konsilia kunveno de U.F.E.

27-an de septembro: unua konsilia kunveno de la Pariza Federacio.

Poste la konsiliaj kunvenoj regule okazis.

-Kursoj : En Parizo trigradaj,
En Bourg-la-Reine, Le Perreux, Sainte-Geneviève-des-Bois,
Clamart provis (ĝis nun sen sukceso).

-Kunvenoj : la prezidanto rememorigis la ĉefajn.
Konversaciaj rondoj en Parizo kaj Le Perreux
Vespermanĝo ĉiumonate ĉe pariza restoracio.
OKTOBRO:Ste-Geneviève-des-Bois kaj Etampes
NOVEMBRO: Literatura vespero memore al niaj forpasintaj gesamideanoj.
DECEMBRO: Inaŭguro de la sidejo
Prezento de "Esperabto sen peno"
Zamenhofa vespero.
JANUARO: Trireĝa kuko kunveno.
MARTO: Pariza federacia kongreso en Sainte-Geneviève-des-Bois.
APRILO: La Houssaye-en-Brie.
MAJO: En Sceaux vizito de la kastelo kaj kunveno de la U.E.A.-delegitoj.
En Mantes-la-Jolie: kongreso de J.E.F.O
En Saint-Germain-en-Laye: Promenado tra la arbaro.

Oni kun plezuro konstatis ke meznombre okazis ĉiumonate almenaŭ unu renkontiĝo.

Diversaĵoj

Elekto de la nova estraro (modifo kompare kun la antaŭa protokolo):

| | |
|---|---|
| prezidanto: | S-ro R.Despiney |
| vic-prezidantoj: | S-roj Gaudry kaj Guillaume |
| sekretario: | S-ro Delatte |
| kasisto: | S-ro J.Rousseau |

Membraro: S-ro J.Rousseau precizigis ke ni estas 270 federacianoj.

Ŝanĝo de la statutoj pro la translokiĝo.

Gratuloj de la prezidanto al la kursgvidantoj de la Pariza regiono.

-La kunvenoj de la gejunuloj plensukcesis. S-ro Patrick Deveughèle el la grupo de le Perreux respondecas pri la skolta movado.

-Bulteno: la N° 10-a aperis. Tiu oficiala ligilo, 4 aŭ 6 paĝa de nia federacio aperas regule.

2.2 Diskuto

Malmultaj gesamideanoj vizitis la konversacian rondon de Parizo; ŝajnas ke la situo de la loko ne konvenas. La etoso de la antaŭa loko (rue d'Athènes) estis pli varma, pli taŭga; la partoprenintoj estis pli nombraj.

3°) Laborplano 74-75

3.1 Grupoj

S-ro Saudian-Rousseau esperas starigi novan grupon, kaj serĉas kursgvidanton.

D-ro Duplan havos kontaktojn en Versailles por revigligi la tiean grupon.

3.2 Kursoj

Oni povas esperi kursojn en tiuj urboj: Bourg-la-Reine, Clamart, Enghien-les-Bains, Le Perreux, Mantes-la-Ville, Paris, Rueil-Malmaison, Sainte-Geneviève-des-Bois, Versailles.

Estas necese propagandi por trovi kursgvidantojn. (ekz. en la bulteno).

Pri la "10%", libera tempo en la lernejoj: Estas necese ampleksi la Esperanto-instruadon al gelernantoj. Tio dependas principe de la lernejestro.

3.3 Kunvenoj kaj kongresoj

Federaciaj kongresoj

1975 projekto por Enghien-les-Bains.
S-ro Saudian-Rousseau esperas baldaŭ doni jesan respondon. Eble la dato estos konata je la fino de junio.

1976 plano por Rueil-Malmaison
D-ro Duplan proponos al la grupo de Versailles pripensi la eblecon.

3.4. Diversaĵoj

Kotizoj . S-ro Thierry rimarkigis ke la komisioneto pri la simpligo de la kotizoj dormis...Dum diskutado la ĉeestantoj diris

(daŭrigo ĉe la paĝo 3-a)

---

**********

Niaj geamikoj BASTONG ( Les Clayes-sous-Bois )
plezure anoncas ke filo Jerôme, naskiĝis
la 21-an de junio 1974

**********

-=-=-=-=-=-=-=-=-=-

sian opinion. La prezidanto proponis ke S-ro Thierry, kiu malvolvis tiun temon, faru studon tiurilate.

Bulteno

S-ino Amariglio sugestis ke oni kunligos la strebojn de la bonvoluloj. S-ro Henry preparas bultenon kun fotoj kaj desegnoj por sia "Essonne-Esperanto". Ĉu eblas fari solan bultenon por la Pariza regiono, pli ampleksa? Kondiĉe ke oni sendu artikolojn. Oni studos la aferon.

S-ro Bourdeax informis pri la ebleco sendi la bultenon po 7 centimoj anstataŭ 30. Devige oni sendos en la saman poŝtoficejon kiel por la nacia revuo, kun titolo:"supplément à Revue Française d'Espéranto", minimume 100 ekzemplerojn. S-ro Despiney, zorganto kaj redaktoro de la federacia bulteno, iomete timas pro manko da tempo, ĉar estos necese sendi el Parizo (12-a distriko) anstataŭ la proksima poŝtoficejo de lia loĝurbo.

Delegitoj de U.E.A.

S-ino Amariglio legis la raporton pri la kunveno de Sceaux. Okaze de la vizito de eksterlandanoj S-ro Guillaume deziras ke kelkaj delegitoj estu pretaj por helpi eventuale precipe dum somero. Oni kontaktus ilin telefone.

Aŭtomobila Klubo

S-ro Guillaume daŭre varbas membrojn. La dumviva kotizo kostas nur 6 F. (kun insigno).

Konsilia federacia kunveno

La venonta okazos la 28-an de septembro 1974 je la 14.45 H.

***

K U R S G V I D A N T O J !

K U R S G V I D O N T O J ! !

N E P R E  skribu al

la Federacio indikante la jenajn informojn:

Loko, tago, horoj, grado de viaj

E-o - K U R S O J ; Dankon !

POUR APPRENDRE L' ESPERANTO

LE MEILLEUR MOYEN EST DE PARTICIPER

AUX COURS ORGANISES A PARIS ET DANS

LA REGION PARISIENNE. Veuillez vous

adresser au siège de la Fédération Parisienne Espéranto - tél. 278 68 86 -

***

## NIAJ FEDERACIAJ KONGRESOJ 1965 - 1975

Tiun historieton mi ektrarigardas de 1965 pro tio ke komence de tiu jaro mi ĵus estis naskiĝinta .... "E-ro - vidpunkte !" .

En 1965, 15 esperantistoj partoprenis la Federacian Kongreson en "Salle des Quakers" en Parizo.

En 1966, la bulteno "Paris-Esperanto" aperigis inviton al : " 43ème Congrès Fédéral", kiun ĉ. 25 esperantistoj partoprenis en "Brasserie Zimmer" apud Teatro Châtelet.

En 1967 "Zimmer" ankoraŭ loĝigis kaj nutris la 30 partoprenantojn. Por la unua fojo mi aŭskultis S-ro Raymond Schwartz, kiu ŝerce ofertis al ni sian festbabiladon.

1 9 6 8 : La pariza esperantistaro komencis sian pilgrimantan rondiron por kongresi ne en Parizo mem sed en urboj de ĝia ĉirkaŭaĵo. Saint-Germain-en-Laye havis la honoron esti la unua de la vico. De tiam la varietea posttagmezo prenis gravan parton en la kongres-programo. Partoprenis ĉ. 60 personoj.

1 9 6 9 . Le Perreux-sur-Marne organizis la F.K. kaj samtempe Ekspozicion pri "Le Livre Espéranto". Ĉiuj admiris la bonegan akcepton de la urbestro en salonego kun floroj, ĉampan..o kaj kukoj, kaj ĝuis la agrablan etoson de la restoracio apud la rivero Marno.

1970 : Bezons. Ankaŭ bona kongreso. Mi memoras ke Fraŭlino Gaspard finis sian raporteton pri la grupo de Bezons per tiu spritaĵo : " En nia regiono Esperanto estas nepra "Bezono" - Jes ja, ŝi pravis, ....kaj tio valoras ne nur por Bezons !

1 9 7 1 - Komuna Normanda kaj Pariza federacia Kongreso okazis en Mantes-la-Ville. Nia amiko S-ro Champs bone preparis la aferon. Ĉirkaŭ cent personoj partoprenis.

1 9 7 2 - Bourg-la-Reine, kie kuraĝe S-ino Amariglio relevis la torĉon kiu falis el la mano de D-ro Maillard. Por helpi ŝin taŭgis kongresi en ŝia urbo. Belega salonego kunvenigis la partoprenantojN, kiuj manĝis en "les Halles de Rungis" .

1 9 7 3 - La 50-a Federacia Pariza Kongreso okazis en Parizo en " Foyer International d' Accueil". Denove tiu manifestacio estis komuna aranĝo de la Normanda kaj Pariza federacioj.

1 9 7 4 - Sainte-Geneviève-des-Bois - Ĉiuj partoprenintoj konservos en sia memoro tiun bonegan kongreson aranĝita de nia amiko Henry kaj la Asocio "Renaissance et Culture". Nia lasta bulteno raportis pri ĝi.

1 9 7 5 - La 52-a Pariza Federacia Kongreso okazos ne plu oriente, okcidente aŭ sude de Parizo sed norde, en ENGHIEN - les - BAINS, kie loĝas S-ro J.L. Saudian-Rousseau, vic-Prezidanto de U . F . E ., kiu en la venonta bulteno havos la grandan plezuron prezenti al vi sian ĉarman urbon kun ĝian beletan lagon.

De nun rezervu vian

**d i m a n ĉ o n 9 - an de MARTO 1 9 7 5**

En La Houssaye-en-Brie, la 21an de aprilo 74

Dek kvin personoj partoprenis la dimanĉan kunvenon en tiu ĉarma vilaĝo. La vetero estis sufiĉe bela por permesi al la esperantistoj agrablan promenadon en la parko de la priorejo Sankta Marteno. Meze de ili estis F-ino Sugawara, japana esperantistino, kiu faris grandan bukedon da francaj kaj esperantaj vortoj. La vizito de la malnova preĝejo de la vilaĝo kaj de la nova kapelo de la priorejo permesis kompari du malsamajn stilojn tamen belajn. En la parko ĉiuj interesplene aŭskultis la klarigojn de F-to Marmou pri la bredado de la abeloj. F-to Marmou bone konas tiujn bestetojn kaj instruas la abelbredadon en ĝardeno Luxembourg en Parizo. La abeloj ŝatas la belan barbon de nia amiko, pro tio ili ne pikas lin...

R. D.

---

S-ano CAMPAN komunikas la jenan informon:

Cours d' efficacité personnelle

Institut de Scientologie
58, Rue de Londres PARIS(IX)
2-ème étage - tel: 522 64 12

Mercredi et Vendredi de 20h à 22h.

C O U R S G R A T U I T S
(On peut acheter les ouvrages proposés)

CENTRE CULTUREL D'ESPERANTO DU PERREUX:

LES COURS : Ils auront lieu au Lycée technique Paul Doumer; 2, Rue Paul Doumer, de 20h à 21h°°; le mardi pour le premier degré et le jeudi pour le second degré.
Chaque 4-ème jeudi, à la même adresse, de 19h45 à 21h15 a lieu la "Konversacia Rondo".

JUMELAGE DU PERREUX AVEC FORCHHEIN (R.F.A) :

Un jumelage de villes est toujours une excellente occasion pour tenter de montrer que l'Espéranto peut servir à quelque chose.
Pendant le congès de Hambourg le président du C.C.E.P s'est mis d'accord avec un espérantiste de Nuremberg, ville voisine de Forchheim, pour établir un pont-Espéranto entre les deux villes jumelées.
Les cérémonies officielles du jumelage auront lieu en septembre. On y entendra trois langues l'allemand, le français et l'espéranto.

2-ème FESTIVAL DES ARTS ET DE LA CULTURE :

Il se déroulera sous un immense chapiteau, place de la Mairie, du 3 au 7 octobre.
Il va sans dire que le C.C.E.P y aura un stend d'informations sur place.

---

" Tago sen Esperanto estas perdita por mi "

Prof. D-ro C. STØP-BOWITZ

---

STIMULANTA SENTENCO

Se vi devigas vin fari ion , kiu superas viajn fortojn , ĉi tiuj fortoj pligrandiĝos ĝis nekredebla nivelo.

---

## KALENDARO — SEPTEMBRO - DECEMBRO 1974

**SEPTEMBRO**

14 — Unua kunveno de L.K.K. 75, ĉe Cerisaie, je la 16h por la preparado de la kongresode ENGHIEN-LES-BAINS.

28 — Konsilia federacia kunveno, ĉe Cerisaie, je la 14h45. (Iu ajn rajtas partopreni kiel observanto).

**OKTOBRO**

Malfermo de KURSOJ (legu ĉe paĝo 3-a).

13 — Konsilia kunveno de la asocio de francaj katolikaj esperantistoj ĉe Cerisaie, je la 15hoo.

**DECEMBRO**

14 — Konsilia federacia kunveno, ĉe Cerisaie, je la 14h45 (Iu ajn rajtas partopreni kiel observanto).

---

* LASTA MINUTO - Kiam tiu bulteno estis presata ni eksciis malbonan novaĵon. Post la kongreso de Hamburgo, vojaĝante tra Norda Germanujo, ge-roj J. ROUSSEAU estis viktimoj de aŭtoakcidento. Nia amiko, kasisto de U.F.E kaj de nia federacio, estas sendifekta, sed S-ino ROUSSEAU estas serioze vundita. Ni tutkore bondeziras al ŝi rapidan kaj kompletan resaniĝon.